

Bulgara **ESPERANTISTO**

Lab



1968

9

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. La instrulaboro de la esperantistoj (Iv. Sarafov)	1
* * * Kiom da homoj parolas Esperanton?	2
* * * La oka E-renkontiĝo en Poděbrady (ĈSSR)	2
Vasil Slavov. La arbaro en la bulgara popola kanto	3
Korea fabelo. Vilaĝano kaj nimfo	4
Asen Grigorov. Paco! Amikeco! Kaj Solidaro!	5
* * * Magnetofonstudio „Budapest“	5

ORGANIZA VIVO

V. S., V. Ivanova, K. Vâlev. K. Genčev, E. Daskalov, Ĵ. Zaprianov, C. Kolarov, B. Mladenov	6
Inĝ. S. Mezeruĥa. En bela lando, ĉe belaj homoj	13
I. Andreev. Dua internacia teknika konferenco	15
* * * Bestoj jarcentuloj	15
Iv. Sarafov. Gvidlibro por supera ekzameno. Vol. II	16
At. D. Atanasov. Pri la Bulgara-Esperanta vortaro	16

Kovrilpaĝo: Esperantistoj-festivalanoj antaŭ la montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



LA INSTRULABORO DE LA ESPERANTISTOJ

Jam malfermiĝis la pordoj de la bulgaraj lernejoj — elementaj kaj mezaj. Ne post longe malfermiĝos ankaŭ la pordoj de la superaj lernejoj, de la Universitato. En la lerneajn ĉambrojn eniros la gelernantoj kaj la gestudentoj — viglaj kaj soifantaj pri scioj, pri konoj. La lernejoj ekbruos kiel abelujoj. Nia laborema junularo strebos atingi la suprojn de la kulturo.

Bulgara Esperantista Asocio, la distriktaj komitatoj, ĉiuj esperantistaj societoj ankaŭ komencis aktivan laboron preparante serioze la grundon por la nova lernojaro. La distriktaj komitatoj ellaboras planojn por malfermi plej variajn kursojn en lernejoj, legejoj, entrepenejoj, oficejoj k. a. Tiucele modele agas la Distrikta Komitato en Ruse, kiu kunvokis specialan plenkunsidon por aprobo kaj akcepto de detala instruplano. Ni esperas, ke ankaŭ multaj aliaj distriktaj komitatoj preparis siajn instruplanojn kaj faros ĉion eblan por ilia realigo.

Nia 37-a Nacia Kongreso akceptis gravan rezolucion, en kiu oni turnas specialan atenton al la instrulaboro. Tiun rezolucion ni devas efektiviĝi en ĉiuj punktoj kaj speciale en la punkto pri malfermo de novaj kaj novaj kursoj.

En la Kongreso oni raportis, ke la nombro de la esperantistaj societoj pligrandiĝis, kio pruvas, ke la intereso al Esperanto en nia socio kreskas senĉese. Ni devas utiligi tiun intereson. Gravan laboron tiurilate povas fari la Instruista Sekcio ĉe BEA. La faka amase vizitita kunsido de la instruistoj dum la kongreso en Varna prenis bonajn decidojn kaj elektis novan Estraron. La Estraro ellaboris tre detalan planon, kiun efektivigos ĉiuj geinstruistoj en la lando. La Distrikta Komitato en Smoljan organizis kurson por instruistoj, kiuj sin preparis por instrui la lingvon.

La esperantistaj societoj senprokraste devas komenci la organizadon de la kursoj. Tiucele oni povas kaj devas aranĝi specialajn prelegojn, publikigi propagandajn artikolojn en la lokaj jurnaloj, disvastigi sciigojn kaj informojn per radioretoj, laŭtparoliloj, aranĝi ekspoziciojn k. a.

La kursgvidantoj devas prepari sin bone, ellaborante anticipe konvenajn laborplanojn. Ili devas zorgi pri ĝustatempa havigo de lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj. La sukceso de nia instrulaboro en kursoj kaj lernejoj dependas precipe de la bona kaj entuziasma laboro, kiun efektivigos niaj esperantistoj-instruistoj en urboj kaj vilaĝoj.

Okaze de la glora jubilea jaro — la 25-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario — ni organizu pli amasan kaj pli rezultodonan in-

struadon kaj studadon de Esperanto en nia lando. Ni ne forgesu, ke nia plej grava tasko estas eduki la junajn generaciojn en la spirito de vera patriotismo kaj internaciismo, batali por pli feliĉa vivo kaj paco inter la popoloj en la tuta mondo.

Al senĉesa instrulaboro — pli varia kaj pli fruktodona!

KIOM DA HOMOJ PAROLAS ESPERANTON?

Jen tikla demando, kiun faras preskaŭ ĉiu, kiu informiĝas pri la Internacia Lingvo. Ĉi-sube ni publikigas intervjuon efektive oka-

zintan antaŭ nelonge en Urugvajo. La intervjuato estis akademiano E. Sonnenfeld. Ĝestu helpo ankaŭ al aliaj!

Jurnalisto: Kiom da esperantistoj estas en la mondo? Ĉu vi taksas ilian nombron je pluraj milionoj?

Sonnenfeld: Pluraj milionoj ja eklernis Esperanton, se ni juĝas laŭ la nombro de lernolibroj venditaj kaj kursoj gviditaj, sed la nombro de tiuj, kiuj fakte scias praktiki la lingvon, restas, miapoinie, sub unu miliono.

Jurnalisto: Sed tio ja estas nombro sensignife malalta! . . . Post 80-jara ekzisto, kiel do oni povas esperi, ke la lingvo iam konkurencos kun idiomoj kiel la angla, franca, rusa, germana, hispana, ĉina aŭ eĉ nur la nederlanda?

Sonnenfeld: Mi kredas, ke oni eraras, pesante simple ciferojn, sed ne esplorante zorge, kion ili signifus. Mi scias, ke en Montevideo el 1¹/₄ da mi-

liono da loĝantoj multaj miloj eklernis la anglan, sed kiom el ili scipovas paroli aŭ eĉ nur kompreni ĝin? Ne interesas nin la centoj da milionoj, kies denaska lingvo estas la angla, sed interesas nin, kiom da neanglalingvanoj scias facile uzi ĝin? Se la problemoj estas starigita tiel, la nombro de la Esperanto-parolantoj ne estas malgranda. Ili ja ĉiuj estas dissemataj en „fremdaj“ landoj. Unu miliono da esperantistoj signifas unu milionon da aktive parolantaj unu solan fremdan lingvon tra la tuta mondo. Kiom da milionoj scias aktive uzi iun alian lingvon, kiun ili ellernis por interkompreniĝi kun fremdlandanoj?

El „Esperanto“, № 7—8/1968

LA 8-a E- ENKONTIĜO EN PODĚBRADY (ĈSSR)

La esperantistaro jam alkutimiĝis legi pri la sukcesaj renkontiĝoj, kiujn organizas la vigla esperantista klubo de la baninstituto en banloko Poděbrady. Ankaŭ ĉi-jare la renkontiĝo estis kultura kaj amuza, plena de amikeco kaj bonhumoro. En ĝia kadro estis aranĝita la 3-a Internacia Esperantista Ŝakturniro. Ĝi pruvis, ke ankaŭ esperantistoj-ŝakludantoj estas kapablaj organizi seriozajn ŝakturnirojn. La ĉefajn tagojn partoprenis pli ol 100 gesamideanoj enlandaj kaj eksterlandaj. La poŝto uzis porokazan stampilon kaj ŝaklu-

dantoj eldonis tri diversajn kovertojn

La partoprenantoj ĝuis la akvosanigan kuracadon kaj banadon en la banejoj. Plue ili estis akceptitaj en la urbestro kaj ĉe tiu okazo la pioniro de la movado s-ano Pytloun ricevis la honoran agnoskon pro sia meritplena laboro por la urbo Poděbrady.

La renkontiĝo estis aranĝita sub la devizo „Pacon al la mondo, sanon al la homaro“.

Venontjara 9-a renkontiĝo okazos je la 4—6-a de julio 1969.



LA ARBARO EN LA BULGARA POPOLA KANTO

de Vasil Slavov

Fremda al tiu klereco, kiun transdonis la bizanca influo, la bulgara popolo dum la tuta periodo de la kvincentjara otomana jugo daŭrigis siajn intimajn rilatojn kun la tradicioj de sia antaŭ-kristana kulturo, pli proksima al ĝia vivmaniero. Eble pro tio, ke malmultaj ĝojoj estis en ĝia ĉiutaga vivado dum la duobla jugo, kaj malmultaj — la eksteraj eventoj, indaj por esti konservitaj per nia popola kanto, la mitaj agentoj de la naturo — nimfoj, feinoj, drakoj, driadoj k. a. ludas grandan rolon en nia folkloro. Eĉ tie, kie partoprenas Jesuo, la Madono, diversaj sanktuloj, — en pli multaj okazoj ili nur anstataŭis pli fruajn mitajn heroojn.

Sed ankoraŭ pli grava karakterizaĵo de la bulgara popola kanto estas ĝia ligo kun la „kvazaŭpatra Maljuna Balkano“ (laŭ la esprimo de la poeto Penĉo Slavejkov). Sub la ombro de l' Balkano nia popolo pasigis preskaŭ tutan sian vivon, kune kun ĝi kantis, al ĝi plendis, de ĝi ĉerpis konsolon kaj esperon. La Balkano kaj la bildo de la patrolanda naturo — en la larĝa kadro, en kiu pasis la eventoj, kuŝantaj en la fundamento de la pli granda parto — kaj la plej bona — de niaj popolaukantoj, precipe dum la lasta jarcento antaŭ nia liberigo, kiam la viglaj aspiroj de la popolo al libero konkrete sin esprimis en la hajduta movado, kaj la Balkano pli kaj pli ofte pleniĝas de la libera hajduta kanto.

Lirikkantoj, elegioj, baladoj, moraj popol-kantoj ordinare havas en sia fundamento belan naturbildon, ĉirkaŭ kiu disvolviĝas la eventoj:

1. Sun' malantaŭ verdarbar' subiras,
sidas ĉe l' arbaro junbravulo,
tagojn nombras, la sorton malbenas. . .
2. Miaj okuloj, rigardu,
ĝis plensatiĝo rigardu —
tiun ĉi vastan kamparon,
kie malvarma venteto
blovas kaj fleksas la herbon,
koron malgajan konsolas.
Ho, malvarmeta venteto,
ĉesu, ne blovu, atendu,
mi vin pri io demandas. . .
3. Kio al mi blankas, blankas kaj luliĝas,
blankas kaj luliĝas trans Danubo blanka?
Ĉu ĝi estas cignoj, aŭ ĝi estas neĝo,
ĉu ĝi estas neĝo, aŭ ĝi estas pluvo?
. . . Nek ĝi estas cignoj, kaj nek blanka
neĝo,
nek glacio estas kaj nek estas pluvo, —
tie reĝo haltis kun armeo granda —

blankaj eniĉaroj. . .

4. Falis malluma nebulo,
post nebul' roso etguta,
post ĝi knabin' nudpieda,
post knabin' junpetolulo
kaj post li patrin' maljuna. . .

Tiu ekstazo kreita de l' patrolanda naturo estas fonto de tiaj perloj, sub kiuj plej bona poeto ne rifuzus meti sian nomon:

Kiel mi estas ĝojega,
Ĉio al herbo eliras —
ke la printempo jam venis!
en arbar' griza brutaro —
en kampar' paŝtas paŝtistoj,
la nigrharajn ĉevalojn
kaj milmilojn da ŝafetoj
ankaŭ centojn da kaprinoj. . .

Specialan rolon tiurilate ludas la arbaro:

Estas l' arbaro ĉiam silenta . . .
kaj al neniu vorton ĝi diras. . .

Sed en nia popola kanto ĝi estas ĉiam vivanta kaj ĉiam preta respondi al la direktita al ĝi demando aŭ manifestita konfido. Pro tio al ĝi la junedzino elploras siajn dolorojn:

— Nigru, ho arbar' fratino, ke ni ambaŭ
nigru —
vi pro via foliaro, mi pro am' unua.
Vin, ho belarbar' fratino, vin prujno difektis
panjo min, arbar' fratino, juna edzinigis. . .
Via foliar', fratino, ree ekburgonos,
sed al mi junec', fratino, plue ne revenos. . .
Plej bone estas evidentigita ĉi tiu ligo kun
la arbaro en la „hajduta“ kanto.
Ekploris jam la arbaro, —
l' arbaro kaj la montaro,
de la arbar' la branĉaro,
de la branĉar' la folioj
pro Inĝe juna vojevodo. . .

Kaj ankaŭ:

. . . Ĉu vi havas freŝan akvon?
Ĉu vi havas densan ombron?
Al Inĝe l' arbar' diradis:
— Venu vi, Inĝe vojevodo,
mi al vi preparos ombron,
freŝan akvon mi fluigos,
kiel ja por vi konvenas,
kaj por vi, ho vojevodo,
kaj por la bravuloj viaj.

Tia estas la ĉarmo de la arbaro, ke neniu povas rezisti al ĝia tento:

— He, arbar', arbaro verda,
mia voj' tra vi ne pasas,

sed de tie ĉi mi pasos,
ĉar vi havas densan ombron
kaj malvarman klaran akvon. . .

Kaj ĉi tiuj himnoj de l' arbaro kaj la montaro en nia popola kanto estas la ĝermo, kiu dum la periodo de la bulgara Renesanco kaj la revoluciaj luktoj ekĝermis per la plumoj de Ljuben Karavelov, Dobri Ĉintulov, Ivan Vazov kaj iliaj daŭrigantoj, por atingi sian apogeon en la verkaro de nia granda poeto kaj revoluciulo Ĥristo Botev:

. . . Jam vesperiĝas, luno leviĝas,
brilas de l' steloj la karavano,
bruas arbaro, vento ekblovas —
kanton hajdutan kantas Balkano.
Ar' da driadoj en blankvestaĵo,
ĉarmaj, belegaj, milde aliras
kanton kantante tra l' verdherbaĵo
kaj ĉe l' heroo venas, eksidas. . .

Tial en la popola kanto la arbaro estas ne nur amiko kaj protektanto, sed ankaŭ fonto de

konsolo kaj novaj esperoj. De ĝi nia popolo ĉerpis kaj ĉerpas kuraĝon por renkonti trankvile ĉiujn malfacilaĵojn. Kaj ĝi havis plenan fidon, ke ĝi trovos en si mem fortojn por venki suferojn kaj malbonojn, — same kiel la arbaro ne timas la vintrajn frostojn kaj ŝtormojn.

Kaj tiu ĉi kredo, simbolo de l' popola sorto, trovis esprimon en tiu mirinda kanto, de kiu tiel multe estis ravita la fama rusa poeto Balmont:

Nek ŝpinis arbar', nek teksis,
ĝi tutan vintron malsanis,
sed venis la tag' de Georgo*
kaj mem la arbar' sin vestis:
tuta en verda vestaĵo,
tuta en verda mantelo,
tuta en verda veluro.

* Festotago de Sankta Georgo (sesa de majo)

VILAĜANO KAJ NIMFO

Korea fabelo

Iu korea vilaĝano decidis iri en la arbaron por ligno. Li devis pasi tra ponto de rivero.

Kiam li trapasis, li ellasis sian hakilon en la akvon. Pro ĉagreno li sidiĝis sur la bordon kaj ekploris.

Aŭdis lin la nimfo kaj demandis:

— Kial vi ploras?

La vilaĝano respondis:

— Mi ellasis mian hakilon en la riveron kaj nun mi ne havas per kio tranĉi al mi lignon.

La akva nimfo kompatis lin, prenis el la akvo oran hakilon kaj demandis:

— Ĉu via estas tiu ĉi hakilo?

La vilaĝano respondis:

— Ne, ĝi ne estas mia.

La nimfo eligis alian, arĝentan hakilon.

La vilaĝano ree diris:

— Ne estas la mia.

Tiam la nimfo eligis la veran haki-

lon. La vilaĝano ekĝojis:

— Jes, tiu ĉi estas mia hakilo.

La nimfo donacis al la vilaĝano la tri hakilojn pro lia honesteco.

Kiam revenis en sian vilaĝon, la vilaĝano montris al siaj kamaradoj la hakilojn kaj rakontis kio okazis al li.

Tiam unu el la vilaĝanoj decidis fari la samon: li iris al la rivero, intence ĵetis sian hakilon en la akvon, sidiĝis sur la bordon kaj ekploris.

La nimfo eligis la oran hakilon kaj demandis:

— Ĉu via estas tiu ĉi hakilo?

La vilaĝano ekĝojis kaj ekkriis:

— Mia, mia ĝi estas.

La nimfo ne donis al li la oran hakilon, sed ankaŭ lian propran ŝi ne redonis — pro lia malhonesteco.

*El la libro „Koreaj popolaj rakontoj“
Tradukis: St. Bakarov*

„Bulgara Esperantisto“ estas nia komuna E-batalilo. Subtenu ĝin per ĉiuj fortoj kaj rimedoj! Abonu ĝin! Abonigu aliajn!

PACO! AMIKECO! KAJ SOLIDARO!

Asen Grigorov

Venis Sofion — ondo post ondo —
forta torento — mondjunularo.
Skandas kun ĝi la tuta mondo:
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Flirtas libere blanka standardo
de l' grandioza junec-festivalo.
Vokas devizo ĝia — rigardu:
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Iras antaŭen amik' post amiko —
kaj el Eŭropo, kaj trans la maro,
el Ameriko, Azio, Afriko.
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Hindo, arabo kaj brazilano
iras kun franco kaj kun hungaro,
paŝas germano, sekvas japano.
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Jen gejunuloj de Sovetio —
ilin aplaŭdas la homa maro,
kaj portas sin entuziasma krio:
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Kiam en firma paŝas kolono
de Vjetnamio la junularo,
tondre salutas la stadiono:
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

Paŝas de nia planed' la espero,
paŝas la junco de la homaro,
paŝas la estonteco de l' tero.
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

For la milito, atomminaco!
Tenu nin kune, firme ni staru!
Ĉiuj ni kune luktu por paco!
Paco! Amikeco! Kaj solidaro!

MAGNETOFONSTUDIO „BUDAPEŬT“ (M. S. „B“)

Ĉe la Magnetofonstudio „Budapeŝt“, kiu estas kunlaboranta organizaĵo de la Hungara Radio kaj Televido, fondiĝis Esperanto-Sekcio.

En la kadro de M. S. „B“ agadas pli ol 300 membroj (ĉiuj posedas proprajn magnetofon-aparatojn), kiuj havas propran studiejon en la Cefurba Kulturdomo, Budapeŝt XI, Fehérvári ut. 47.

Celo de la Esperanto-Sekcio estas:

1. Krei fortan bazon por la esperantlingva danco kaj facila muziko; produkti altkvalitan sonbendserion pri popolkantoj, mondfamaj ŝlagroj, mondfamaj operetoj ktp, voĉraportojn el la vivo de la hungaraj esperantistoj kaj kluboj kaj ilin transdoni al la Esperanto-programo de Radio Budapeŝt kaj aliaj stacioj.

2. Krei internacian kulturan kontakton kun esperantistaj kaj neesperantistaj magnokluboj kaj spertaj unuopuloj (samfakuloj) sonbendistoj el la tuta mondo.

3. Interŝanĝi sonbendojn kaj gramofondiskojn pri la novaĵoj. Regule informadi unu la alian pri la plej novaj ŝlagroj de mondfamaj kantistoj kaj muzik-orkestroj.


Regule sendadi la plej altkvalitajn sonbendojn HI—FI. Helpi la Internacian esperantlingvan dissendadon de Radio-kaj Televidstacioj per forsendo de altkvalitaj taŭgaj sonbendoj „HI—FI“ nur 19 cm/sek rapideco sub la titolo: „Sonbendistoj, atenton!“ (ĉiam en Esperanto).

5. La supre menciitan celon helpas el la Hungara Radio bone konata „Beat“-orkestro Tolcsvay — kaj eminentaj konataj kaj profesiaj aŭ amatoraj gekantistoj, kiuj kun siaj talentoj estas je kultura kaj muzika servo de la internacia E-movado.

Por la M. S. „B“ ni petas ĉion sende rekte al la teknika gvidanto de la Stacio. Adreso: Ladislao B. Tóth, Budapest IX, Vaskapu utca 1/B, Magyarorszá



Jambol! Mi kaj miaj geamikoj-esperantistoj el Sopot kaj Karlovo, kiuj vizitis vin, la urbon de Diana, neniam forgesos vin! Por ĉiam restos en nia memoro la devizo, inkrustita sur via



blazono: „Ni venas el la antikveco, ni iras en la estontecon“.

Nia grupo, konsistanta el 17 geesperantistoj, veturis al Jambol kun flir-tanta verda standardo rimarkebla de malproksime. Niaj koroj batis plenaj de ĝojo.

Tuj post nia alveno en la urbon ni kun 20 lokaj geesperantistoj direkti-ĝis al la bela arboparko „Bakaĝici“. En la montodomo tie ĉi ni pasigis du neforgeseblajn tagojn — la 6-an kaj la 7-an de julio. K-doĵ Dimo Trudoljubov kaj Nikola Ganev, prezidantoj de E-societoj „Maksim Gorkij“ (Jambol) kaj „Vasil Levski“ (Karlovo) parolis pri la agado de siaj societoj. K-do Boĵidar Leonov (Karlovo) raportis pri la agado de la E-junularo.

V. S.

(el Sopot)

FONDA KUNVENO DE KOMISIONO PRI TURISMO ĈE BEA

En la kadroj de la 37-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en Varna okazis granda kunveno de esperantistoj-turistoj. Pri la agado de la diversaj E-sekcioj parolis Nikola Nikolov (Sofio). Li substrekis, ke dum la lastaj jaroj ilia nombro en la lando konstante kaj rapide kreskis. Nikolov proponis fondon de nacia komisiono pri turismo ĉe BEA. La propono estis renkontita kun entuziasmo. En la eldiroj estis faritaj multaj praktikaj proponoj pri la estonta agado. Interalie: oni postulu, ke prospektoj de turistaj organizaĵoj en nia lando estu eldonataj ankaŭ en Esperanto; hoteloj, parkoj, placoj, stratoj k. a. ricevu la nomojn „Esperanto“ kaj „Zamenhof“; oni eldonu nomaron de

esperantistoj, kiuj laboras en poŝtejoj, bankoj kaj similaj, kiuj povus helpi eksterlandajn turistojn k. a. Sed la plej grava tasko de la novefondita komisiono estas — propagandi Esperanton inter la turistoj kaj la turismon inter la esperantistoj. Por la bulgaraj turistoj la komisiono organizos la eksterlandan kaj enlandan turismon.

Estis elektita estraro de la Komisiono kun reprezentantoj el ĉiuj ĝis nun ekzistantaj sekcioj kaj buroo el Sofio en konsisto: Nikola Nikolov (prezidanto), Balju Balev, Dimitr Motuŝev, Vesela Ivanova, Asparun Ŝumski, Nadeĵda Ĉip-lakova, Manol Jordanov.

V. Ivanova

ESPERANTO EN LA IX FESTIVALO DE L' JUNULARO KAJ LA STUDENTOJ EN SOFIO

Plensukcesa, impona, brila, grandioza — tiaj estas la komunaj pritaksoj de la IX Festivalo de l' Junularo kaj la Studentoj, kiu okazis de la 28-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto j. k. en Sofio — la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario. Sub la festivala slogano „Por solidareco, paco kaj amikeco“ manifestis pli ol 25 000 gejunuloj el 142 landoj de ĉiuj kontinentoj. La IX Festivalo lasis neforgeseblajn memorojn en ĉiuj, kiuj ĝin partoprenis aŭ observis. Ĝi estas nova granda paŝo antaŭen en la batalo de l' junularo kontraŭ imperialismo, koloniismo kaj novkoloniismo, kontraŭ militarismo, tiraneco kaj mallumo — por nova mondo de paco, amikeco kaj feliĉo.

Sub la festivala slogano bone manifestis ankaŭ la junaj esperantistoj. En la oficiala festivala programo ili havis tri specialajn aranĝojn: oficiala kunveno, festo ĉe montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa kaj ekskurso tra la lando.

La oficiala kunveno

Ĝi okazis la 2-an de aŭgusto en la Supera Kemi-Teknologio Instituto. Partoprenis ĉirkaŭ 80 gejunuloj el 11 landoj. Tio estis la nura internacia aranĝo en la kadroj de Festivalo, dum kiu oni ne bezonis interpretistojn.

La kunvenon salutis: Ĥristo Gorov — en la nomo de CK de Bulgara Esperantista Asocio, Marie Hélène Bourdier (francino) en la nomo de TEJO, Klara Vargo el Hungario, esperantistoj el Japanio, Pollando, Jugoslavio.

Bonegan prelegon pri la kontribuo de l' esperantistoj por internacia kompreniĝo, kunlaboro kaj amikeco faris inĝeniero Simeon Simeonov (bulgaro). En la diskutado partoprenis: Ken Keable (Kejbl) el Anglio, Vladimir Samo-

daj el Sovetunio, Coĉo Kolarov el Bulgario k. a. S-ano Keable speciale emfazis la fakton, ke la IX Festivalo donis bonan lecionon al liaj samlandanoj, ĉar tie ĉi oficiala lingvo ne estis la angla (kiel kutime dum internaciaj aranĝoj), sed la franca, kaj la plimulto de la angla festivala grupo ne posedis ĝin. Ĉiuj parolintoj substrekis la egan neceson, ke oni uzu Esperanton dum internaciaj aranĝoj — ĝi ŝparas tempon kaj monon kaj certigas tujan senperan kaj plenan interkomprenon de ĉiuj partoprenantoj. Kelkaj el la parolintoj turnis specialan atenton al la problemo pri la neŭtraleco de Esperanto. Oni varme aplaudis la vortojn de V. Samodaj, kiu interalie diris: „En la internaciaj E-organizaĵoj kaj agado ni, esperantistoj, ĉiam devas esti por neŭtraleco rilate rason, naciecon, religion ktp., sed ni ne povas esti neŭtralaj aŭ pli ĝuste — indiferentaj, kiam politikaj banditoj sklavigas tutajn popolojn, ĉar tio signifus, ke ni helpas ilin. Rilate militon kaj pacon ni ne povas esti neŭtralaj!“

La diskutado pasis en atmosfero de reciproka estimo kaj amikeco.

Fine de la kunveno estis projekciita filmo pri la 48-a Universala E-Kongreso en Sofio (1963 j.).

La festo ĉe montodomo „Esperanto“

La 4-an de aŭgusto matene tri aŭtobusoj, plenaj de ĝojaj geesperantistoj-festivalanoj, ekveturis al la ĉarma monto Vitoŝa apud Sofio. Tie, ĉe montodomo „Esperanto“, ili partoprenis neforgeseblan E-feston kune kun kelkaj centoj da esperantistoj el Sofio, Plovdiv k. a. La festan solenaĵon malfermis la prezidanto de la Turista Sekcio „Esperanto“ en Sofio Nikola Ni-



Ken Keable muzikas

kolov. Sekvis salutparoloj de reprezentantoj el Anglio, Sovetunio, Francio, Pollando, Japanio.

Poste — internacia belarta programo. Unu post alia antaŭ la publiko aperis talentaj junaj esperantistoj el diversaj landoj, kiuj recitis, legis proprajn originale verkitajn en Esperanto versaĵojn, kantis, ludis diversajn instrumentojn. La entizuasmigita publiko varme aplaudis ilin.



Sur Vitoŝa sonas japanaj kantoj

Ekskurse tra bela Bulgario

Bonega estis la ekskurso de la esperantistoj-festivalanoj al la distrikto de Vraca, kiu okazis la 5-an de aŭgusto.

Vraca, urbo de la brila kongreso de 1^a junaj esperantistoj en 1963 j., ankaŭ nun akceptis varme la karajn gastojn. Ili vizitis la memortabulon starigitan okaze de la XIX junulara E-kongreso, ankaŭ la faman groton Ledenika prok-

sime de Vraca kaj havis specialan renkontigon kun la membroj de la Distrikta Komitato kaj la estraroj de la E-societoj en la urbo. Junpioniroj prezentis florbukedojn al la gastoj kaj ornamis iliajn brustojn per la speciala insigno de Vraca.



N. Kandinska salutas la gastojn. Laŭ malnova popola bulgara tradicio oni renkontas la gastojn per pano kaj salo

Esprimanto de ĉies sentoj fariĝis s-ino Marie Hélène Bourdier, kiu estis vizitinta Vraca dum la junulara E-kongreso en 1963 j. Interalie ŝi diris, ke gum la nelonga tempo ekde tiam la drbo pligrandiĝis kaj plibeliĝis, oni starigis multajn novajn belajn konstrua-



Vladimir Samodaj respondas

ĵojn, novan imponan monumenton de la granda nacia poeto-revoluciulo Hristo Botev, konstruis keikajn uzinojn, bo



nege rekonstruis la centron de la urbo.

Sed aparte neforgesebla restos la vizito de la festivalanoj-esperantistoj en urbo Kneĵa, distrikto de Vraca. Kneĵa estas riĉa agrarmastruma urbo, kiu kuŝas en la Danuba ebenaĵo. Ĉi tie la karajn gastojn renkontis ne nur la lokaj esperantistoj, sed ankaŭ centoj da aliaj urbanoj kaj junpioniroj kun bukadoj en la manoj. Multloke oni vidis sloganojn en Esperanto, verdajn standardojn. Sur la centra placo de la urbo okazis impona mitingo. En la nomo de la Urba Komsomola Organizaĵo la ga-



Regale vinon el popola lignobotelo. Unualoke — Marie H. Bourdier

stojn bonvenigis ĝia sekretariino N. Kandinska. Respondis per varmaj salutparoloj Vl Samodaj, Marie H. Bourdier, Ken Keable, Klara Vargo kaj d-ro Konstantin Kornesku (Rumanio). En ĉiuj paroloj flamis neŝancebla kredo en la hela estonto de l' homaro, firma volo

al batalo por paco kaj amikeco sur la tero.

Post la mitingo la gastoj vizitis kelkajn agrarmastrumajn objektojn en la urbo. Kun granda intereso ili aŭskultis la vortojn de la direktoro de l' moderna porkuzino, kie dank' al la mekanikigo de la plej laborampleksaj procedoj oni grave plialtigis la produktivecon kaj grasigas po ĉirkaŭ 30 000 porkoj ĉiujare por viando.

En la Instituto de Maizkulturado la vicedirektoro rakontis pri la grandaj sukcesoj de la agrarmastruma scienco en Bulgario, pri la eltrovoj de novaj, pli fruktodonaj specoj de maizo, pri sciencaj eksperimentoj. En la Instituto oni donis riĉan lunĉon, interalie bongustan boligitan maizon, kiun la gastoj speciale ŝatis. Oni disdonis ankaŭ memoradacojn.

Kun granda plezuro la gastoj vizitis vitkulturistan brigadon meze de la vastegaj vitkampoj. La afablaj gebrigadanoj kolektis por ili vinberon de plej bonaj specoj, rakontis pri sia laboro kaj vivo.

La vesperon en la centra kulturdomo de la urbo lokaj junuloj prezentis riĉan belartan programon, kiun partoprenis ankaŭ la gastoj. Multaj programeroj estis en Esperanto.

Tiu ĉi neforgesebla tago finiĝis per riĉa bankedo, dancoj kaj amika amuzado ĝis malfrua horo. Dum la tuta tempo inter gastoj kaj dommastroj regis frataj sentoj kaj kortuŝa intimeco. Ĉiuloke oficiala lingvo estis Esperanto.

K. Vălev

LASTA INFORMO

La abonkotizo de „Nuntempa Bulgario“ por nia lando estas 12 lv. (12 numeroj), de „Ripozoj“ — 3,60 lv. (6 numeroj), de „Internacia Ĵurnalistoj“ — 1 lv. (4 numeroj), de „Paco“ — 3 lv. (12 numeroj).

GASTOJ EL NEDERLANDO EN PAZARĜIK

La E-Societo „Radio“ en Pazarĝik aranĝis je la 29-a de majo 1968 j. en la salono de la sindikatoj vesperon de la internacia lingvo Esperanto.

Karaj gastoj estis gesinjoroj Ru kaj Katrin Bossong el Nederlando, partoprenintoj en la 37-a Kongreso de BEA en Varna. La gastoj estis plej kore salutitaj de la veterano Ivan Vasilev kaj de la vicprezidanto de la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco Dano Petrinski.

Kun granda atento oni aŭskultis la gastojn, kiuj parolis pri la vivo kaj la E-movado en sia urbo.

Pro aktiva longjara E-laboro oni honoris plej solene per oraj insignoj Ivan Vasilev, Sotir Vasilev kaj Kosta Konstantinov, per arĝentaj insignoj Petko Arnaudov, Nikola Cârcarov, Najden Angelov, Konstantin Genĉev kaj Ljubomir Leviĉarov kaj per bronzaĵaj insignoj Rosica Georgieva kaj Aleksandr Arnaudov.

K. Genĉev

NI PLENUMIS LA PLANON DE NIA RONDO

Dum la pasinta lernojaro en Vraca funkciis tuturba lernanta rondo de Esperanto, kiun partoprenis lernantoj el la Teksa Teknikumo, la Teknikumo de Vestajaĵoj kaj la gimnazio. La rondo laboris laŭ anticipe akceptita plano. Fine de la lernojaro la rondanoj organizis kunvenon por pridiskuti sian tutjaran laboron. Estis invititaj ankaŭ la plej bonaj lernantoj el la kvin fakultativaj kursoj ĉe la Teksa Teknikumo kaj el la du kursoj ĉe la Teknikumo de Vestajaĵoj — tiujn, kiuj havis plej altajn poentojn (sesojn kaj kvinojn) de Esperanto.

La lernanto Nikolaj Ivanov raportis koncize pri la tutjara agado. Estas ellaboritaj 40 tabuloj pri la gramatiko

de Esperanto; oni regule korespondis individue kaj kolektive; regule oni prizorgis la montrofenestrojn kun esperantaĵoj; 16 gelernantoj faris provleciojn en la E-kursoj: Nikolaj Ivanov, Stojĉo Metodiev, Valentina Boĵinova, Margarita Angelova, Enĉo Dimitrov, Penka Genova, Stamenka Totkova, Nikolaj Asparuhov, Vasil Ivanov, Plamen Angelov k. a. La provlecioj stimulis ĉiujn al pli serioza kaj profunda lernado de la lingvo, ĉar nur la plej bonaj ekhavas la rajton fari tian lecionon — tio estas fiero por ĉiu lernanto.

Oni donis valorajn proponojn pri plibonigo de la laboro de la E-rondo dum la sekvanta lernojaro.

E. Daskalov

La Ĝenerala Germana Blindul-Ligo de GDR eldonos Esperanto-Revuon „Amikeco“. Jara abonkotizo 3 m. g.

La Revuo enhavas artikolojn pri la vivo de blinduloj en GDR kaj tradukaĵojn el gravaj verkoj de la germana literaturo. La esperantistoj estas petataj sendi siajn mendojn senpere al „Eldonejo de la Germana Centro-Librejo por Blinduloj, GDR 701 Leipzig, Gustav-Adolf-Str. 7, Poŝtfako 245“.

Interesuloj, petu tuj provnumerojn de Revuo „Amikeco“!



En Dimitrovgrad jam estiĝis tradicio, ke ĉiujare je la 1-a de majo kune kun la kolonoj de la laborhomoj ankaŭ la esperantistoj manifestacias. En bone orditaj vicoj pli ol 100 gesperantistoj el la tri urbaj E-societoj ankaŭ ĉi-jare pasis antaŭ la oficiala tribuno kun multaj sloganoj kaj standardoj. Frunte de la manifestacio oni portis esperantan standardon, la portreton de d-ro Zamenhof kaj grandan sloganon: „Per Esperanto al tutmonda paco“.

La imponaj vicoj de la manifestacioj estis rimarkeblaj de malproksime kaj la radio-parolisto per belaj vortoj anoncis: „Proksimiĝas la kolonoj de la esperantistoj, kiuj pere de la Internacia Lingvo batalas por paco kaj amikeco inter la popoloj!“ Al la skanditaj en Esperanto sloganoj: „Vivu la Bulgara Komunista Partio!“, „Vivu la Unua de Majo!“, „Vivu la paco!“ la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj respondis el la tribuno per amikaj aplaŭdoj.

J. Zaprianov

KURSO POR E-ĈIĈERONOJ

La turista oficejo „Pirin“ (Sofio) organizis kurson por ĉiĉeronoj de fremdaj lingvoj. Inter ili estis ankaŭ 10 gesperantistoj. La kurso finiĝis per ekzamenoj la 29-an de majo. Sukcese faris la ekzamenon 8 gesperantistoj, kiuj ricevis la rajton esti ĉiĉeronoj de eksterlandaj turistoj-esperantistoj. Antaŭ ili staras respondeca tasko: klarigi kompetente kaj interesige al la ĉiam plimultiĝantaj eksterlandaj turi-

stoj la naturajn belecojn de nia lando ĝiajn historiajn monumentojn kaj rimarkindaĵojn, kurac- kaj ripozlokojn kaj mineralakvajn banejojn, nian rapidan kaj grandiozan socialisman konstruadon. La novaj E-ĉiĉeronoj devas labori tiel, ke la amikoj de Bulgario ĉiujare plimultiĝu kaj ankaŭ: ke Esperanto penetru ĉiam pli kaj pli en la gravan sferon de la internacia turismo.

V. Ivanova

EKZAMENOJ ĈE LA STUDENTOJ EN SVIŠTOV

Forpasis ankoraŭ unu jaro, dum kiu la gestudentoj en Svištov fervore kaj diligente lernis la Internacian Lingvon. Kaj kiel kutime en la fino de la lernojaro ili faris ekzamenojn. Plej bonajn rezultojn donis kaj plej altajn poentojn ricevis la gestudentoj Vidinka Mladenova, Trifonka Borisova, Ivan Petkov,

Jordanka Delĉeva, Todor Angelov k. a. La profesoro Stojan Ilĉev estas kontenta pri la bona lingva nivelo de ĉiuj, sed precipe pri la grupo de la progresintoj.

Venontjare instruos Esperanton Marie-Hélène Bourdier, kiu intencas gvidi la kursojn laŭ Ĉe-metodo.

C. Kolarov

La gelernanta E-grupo „Verda Raketo“ ĉe II-a gimnazio en Vraca por la jaro 1967 laŭplane devis havi 35 membrojn kaj 30 abonantojn de „Bulgara Esperantisto“. Ĝi havis 40 membrojn kaj 40 abonantojn. Por la jaro 1968 la membroj devis esti 50 kaj la abonantoj — 45. La novefondita ge-

lernanta E-societo „Verda Raketo“ superis la planitajn ciferojn. Por la tuta 1968 jaro la societo jam havas 164 membrojn kaj 140 abonantojn. Certe en la tuta lando ne estas alia societo, kiu atingis tiajn rezultojn.

B. Mladenov

LETERO EL SOVETUNIO

Karaj bulgaraj fratoj!

Baldaŭ venos via granda festo — la glora datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario.

Okaze de la festotago ni sendas al la Redakcio, al la tuta bulgara esperantistaro, al ĉiuj bulgaraj fratoj niajn sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

Ni esperas, ke la bulgaraj esperantistoj, kune kun ĉiuj gelaboruloj de la lando,

gvidate de la glora Komunista Partio, spite ĉiujn eventualajn provojn, spite la atakojn de la imperialismo, ĉiam firme defendos la socialisman tendaron kaj abnegacie konstruos la socialismon en sia patrujo.

La tempo laboras por la socialismo. Pluajn sukcesojn al vi!

Frate via *Jakov Vlasov*

NOVA EDIKTO PRI ESPERANTO EN AŬSTRIAJ LERNEJOJ

La Internacia Lingvo Esperanto estos fakultativa (elektebla) studobjekto en post-elementaj lernejoj (Hauptschulen) en Aŭstrio, se minimume 20 infanoj sekvas la kurson kaj se troviĝas diplomita Esperanto-instruisto. Tiel informas la Leĝbulteno de la Respubliko Aŭstrio (Bundesgesetzblatt der Republik Österreich) de 26. III. 1968, konfirmante la edikton de la Federacia Ministerio por Instruado de 28. II. 1968, artikolo I, sekcio 3/1a.

La aŭstraj „ĉeflernejoj“, pri kiuj temas,

estas publikaj lernejoj por infanoj 10- ĝis 14-jaraj, kiuj ne vizitas mezlernejon. La novaj kondiĉoj por la instruado de Esperanto validos ekde la venonta instruaro.

Tiel Aŭstrio sekvis la ekzemplon de nombro da aliaj landoj (i. a. Bulgario, Hungario, Nederlando, Brazilo, Pollando), en kiuj jam ekzistas oficialaj preskriboj pri la eblecoj por Esperanto-instruado en la lernejoj.

*El „Internacia Gazetara Servo“,
№ 176/1968*

SUKCESO POR ESPERANTO

Okazis unuafojon en aŭstria historio, ke la sekretario de IEMW Herbert März, scienca bibliotekisto, faris sian ekzamenon de bibliotekscienco en la lingvo Esperanto. H. März fondis en 1948 j. Aŭstrian E-Junularon, estis redaktoro de la gazeto „La Distro“, ka-

sisto kaj librotenisto de feriasemajnoj 1963 — Wien, 1966 — Klosterneuburg kaj Eŭropa Esperanto-Konferenco en Wien 1965, kunfondinto de la nun plej granda Esperanto-organizaĵo en Aŭstrio — Aŭstria Esperanto-Movado, kies estrarano li estas.



Kiam dio tutpotenca teron donis al popoloj
 kaj dividis kiam dio inter la popoloj ĝin,
 li forgesis pri bulgaroj, sed eraron rimarkinte,
 ekpensiĝis li profunde: „Kion doni al popol’?
 Kion fari al bulgaroj, por ke ilin ne forpuŝi,
 ne forpuŝi de la dio, de la tutpotenca di!?”
 Kion doni al bulgaroj, por ke ilin kontentigi,
 por ke ili en la mondo havu lokon sub la sun’?”
 Tiel pensis Tutpotenca, sed ĉar dio malfruigis,
 (al popoloj disdonita estis jam ia tuta ter’!),
 pecon de havaĵo propra, de l’ ĉiela paradizo
 donis dio al bulgaroj. Tia estas Bulgari’!

Jen tian legendon rakontis al mi mia malnova bulgara amiko Ĥristo Kerkin el Varna, kiam mi unuafoje alvenis Bulgarion.

Vere bela, paradiza estas la bulgara lando. Vere mirindaj estas la bulgaraj pejzaĝoj: altaj montoj kun densegaj arbaroj surdeklive, kaŝantaj sekretajn partizanajn vojojn kaj rifuĝejojn, kiuj restis de la lasta kontraŭfaŝista milito; herbokampoj abundas per denseharaj ŝafoj, libere vagantaj kvazaŭ antikvaj nomadoj; rapidkuras hastemaj riveroj, kiuj portas siajn akvojn al la maro. Al la Nigra Maro. Sed ĉu ĝi estas vere nigra? Ne, tute ne. Ĝi estas foje verda, foje blua. Alvenu marbordon frumatene, kiam la suno ankoraŭ ne lavis siajn okulojn post nokta dormo, kiam ĝi montriĝas nur per sia unusola radio kaj briletas en mara surfaco simile al kandelfajreto. Maro estas kvieta. Jen ĝi karese lekas marbordon, kvazaŭ ĝin kisas. Ĝi estas milda, sed majesta. Majesta eĉ en sia mildeco. Sed jen la suno ekbruligis la maron kaj ĝi forĵetas sunplenajn orajn ŝprucojn. Nun ĝi pleniĝas de suno. Kaj ŝajnas, ke el mara profundo tuje elnaĝis miloj da oraj fiŝetoj. Sed kiam vi rigardas maron dum luna nokto, vi konvinkiĝas, ke la nokta marbeleco estas ne malpli alloga. Ŝajnas, ke laŭ la arĝenta luna vojeto, kuranta tra la maro supren, estas eble atingi la paradizon, kiu sin kaŝas post la velura ĉielo, truigita de steloj.

Dum dek jaroj mi atendis la tagon de renkonto kun bela Bulgario, kun mia bulgara amiko-esperantisto. Dum dek jaroj ni vigle korespondis. Por mi, por mia familio tiuj ĉi jaroj estis ne tre ĝojaj: ni perdis niajn gepatrojn, la edzino dum longa tempo grave malsanis. Kaj mi fieras kaj ĝojas, ke dum la plej malfacilaj jaroj konstante apud mi estis mia bulgara amiko, kies moralan subtenon kaj apogon mi sentis ĉiunminute. Tio sin montradis kaj en oftaj liaj leteroj, kaj en liverado de neekzistanta en mia lando forta bulgara kuracilo por la edzino. Tamen al ni helpis ne nur la familio de baj* Ĥristo, sed ankaŭ lia hungara amiko, nekonata ĝis tiam al mi, etendis

al ni manon por helpo. Tio estis vera internacia helpo, vera internacia amikeco. Kaj jen nun, kiam finfine en mia familio ĉio eniris bonfluejon, ni laŭ invito de niaj bulgaraj amikoj alvenis Bulgarion. Mi intence elektis por la vizito printempan monaton — majon. Dum tiu ĉi monato en Varna, kie loĝas niaj amikoj, devis okazi du Esperanto-kongresoj: Internacia Fervojista Kongreso kaj enlanda Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio. Mi volis nepre partopreni la kongresojn por travivi kelkajn tagojn en esperanta mondo, en esperanta atmosfero, en la mirinda lando Esperantujo. Krom tio mi deziris partopreni nacian bulgaran feston — la 24-an de majo, Tago de Kiril kaj Metodij, festo de bulgara kaj slava literaturo kaj kulturo.

Do, ni jam estas en Bulgario. Ankoraŭ en la unua post la landlimo bulgara urbo Ruse ni ekvidis esperantajn salutsloganojn. Kaj kiam ni alvenis Varnon, ni trovis tie multnombrajn esperantajn flagojn kaj sloganojn, verdajn Esperanto-stelojn kaj anoncojn, kiuj informis pri la E-kongresoj. Nin renkontis kun florbukedoĝefamilianoj de baj Ĥristo: lia edzino Mara Kostova, kiu dum la tuta nia restado en Bulgario zorgis pri ni, kiel pri buboj, kaj lia filo Angel, kiu estis la ĉefa gvidanto kaj akompananto en ĉiuj ekskursoj kaj promenoj. En la stacidomo de Varna troviĝis akceptejo por alvenantaj esperantistoj. Tie ni ekestis plenrajtaj kongresanoj — ricevis la kongreskartojn kaj aliajn dokumentojn, inter kiuj estis ankaŭ biletoj por senpagaj aŭtobusaj vojaĝoj en Varna kaj senpagaj vojaĝoj per bulgaraj fervojoj. Al la partoprenantoj en la kongresoj tion donacis la registaro de Bulgario kaj la bulgara transporta ministerio.

Speciale impona estis la malfermo de la Kongreso de l’ Bulgaraj Esperantistoj. La granda kongresejo estis plenplena. En la prezidiu-

* baj — estimplena bulgarlingva alparolo al grandaĝulo.

mo — reprezentantoj de la partiaj, sindikataj kaj lokaj organizaĵoj, eminentaj esperantistoj. Salutparolas reprezentantoj de diversaj landaj kaj internaciaj organizaĵoj. Ĉiu parolo kaŭzas aplaŭdojn. Sed jen la prezidanto elparolas: „Je la nomo de sovetiaj kaj moskvaj esperantistoj parolon havas Magomet Isajev, kiu estas ofice delegita al la Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio“. Tondro de aplaŭdoj disŝiris la kongresejon. Per ili ĉiuj partoprenantoj esprimis ne tiom estimon al ni, sovetiaj esperantistoj, kies esperantaj sukcesoj estas dume tre modestaj, kiom estimon al la sovetia popolo, al la sovetia lando, kies sukcesoj kaj venkoj estas fame konataj. Kaj ĝojo, kaj fiero pro nia socialisma patrujo trafenetris ĉiun el la dekdu sovetiaj esperantistoj, kiuj prezentis en tiu ĉi halo nian patrolandon kaj sentis sin kvazaŭ plenrajtaj ambasadoroj de Sovetunio. Kaj la sama fiero, la sama sento, ke mi estas ne simpla eksterlanda gastulo, sed reprezentanto de sovetia popolo en amika Bulgario ofte posedis min ĉu sur la mara bordo, ĉu sur strato, ĉu en la granda uzino „Elprom“, kien min afable invitis bulgaraj amikoj, ĉu en vilaĝa kooperativo „Kamĉijska dolina“, ĉar mi vidis ĉie veran amikecon, profundan estimon, kun kiu sin turnis al mi ĉiuj bulgaroj. Ĉu tiu ĉi rilato estas kaŭzita de iaj miaj meritoj? Tute ne. Mi ne havas meritojn. Meritojn havas la lando, el kiu mi alvenis. La lando, kiu liberigis la bulgaran popolon de la turka jugo. La lando, kiu helpis la bulgaran popolon liberigi sin elsub la faŝista jugo. La lando, kiu helpas la fratan bulgaran popolon konstrui novan feliĉan vivon. La bulgara popolo alte taksas la helpon de Sovetunio. Ne hazarde dum la Festo de Kiril kaj Metodij, kiuj antaŭ mil jaroj donis al ĉiuj slavaj popoloj propran abocon, mi vidis kune portretojn de gvidantoj de la Bulgara Komunista Partio kaj portretojn de membroj de CK de KPSS, portretojn de Lenin kaj Dimitrov, standardojn de Bulgario kaj Sovetunio, sloganojn: „Gloron al sovetiaj popoloj“ „Gloron al sovetia scienco kaj kulturo!“ Dum la festo grandan manifestacion partoprenis pli ol 55 000 lernantoj. Tiu ĉi festo estas festo de la lernantoj. Mi vi-

dis en kolonoj lernantojn de ĉiuj aĝoj. De plej etaj, kiuj portis surkape grandajn slavajn literojn „A“, „B“, „C“, ktp, ĝis lernantoj de la lastaj klasoj, kiuj portis sloganon kun vortoj de V. I. Lenin: „Sen libroj ne ekzistas scioj, sen libroj ne ekzistos komunismo“. Centnombra grupo de gejunuloj en blankaj, verdaj kaj ruĝaj kostumoj formis per la vestoj grandan bulgaran ŝtatan standardon. Jen marŝas infankolono, kantante ruslingve: „Estu ĉiam la suno“! Okaze de tiu ĉi festo la ŝtato distingis per ordenoj de Kiril kaj Metodij la plej elstarajn agantojn de la kulturo kaj klerigo. Nun la Ordenon de Kiril kaj Metodij ricevis la Bulgara Esperantista Asocio pro gravaj meritoj sur la kultura kampo, pro atingajoj sur la kampo de internacia amikeco.

La kulmino de nia ĉeesto en Bulgario estis granda peraŭta ekskurso tra la lando, kiun organizis por ni la bulgaraj amikoj el uzino „Elprom“. Dum kelkaj tagoj ni povis ankoraŭ foje ĝui la belecon de la lando, perokule konvinkiĝi pri la grandaj atingajoj en la socialisma konstruado, ĝui la amikecon kaj la gastamon de la bulgaroj rilate al sovetiaj homoj. Dum tiu ĉi vojaĝo ni vizitis la belegan urbon Târnovo, kiu iam estis ĉefurbo de Bulgario. La pitoreska urbo havas originalan vizaĝon, ĝiaj domoj estas konstruitaj kvazaŭ unu sur la alia, sur la terasoj de grandaj altaĵoj apud rivero Jantra. Ni konatiĝis kun Gabrovo — centro de bulgara teksindustrio, „bulgara Manĉester“, kiel ĝin oni nomas. Kaj ni havis plezuron viziti la historian Stoleto Vrah, kie per komune verŝita sango hardiĝis la rusa-bulgara amikeco dum la liberiga Rusa-Turka milito. Tie, je alteco de preskaŭ 1300 metroj apud intermonto Sipka, staras majesta monumento memore al la rusaj kaj bulgaraj filoj, kiuj pereis dum la milito. Ne povas esti ligoj pli forraj ol tiuj, kiuj ekzistas inter Bulgario kaj Sovetunio, inter sovetia kaj bulgara popoloj. Ligoj, kiuj komenciĝis en fora pasinteco, fortiĝis dum komunaj bataloj por libero kaj nun helpas al niaj popoloj konstrui feliĉan estontecon.

Ing. Samuilo Mezruha

e

LA ANGLA MALFAVORITA

Mario Pei, en „Saturday Review“ 6 aprilo 1968, skribas: „... estas psikologia kaprico de la homa karaktero, ke, kiam al ni ne plaĉas la parolantoj de iu lingvo, same ne plaĉas la lingvo mem. ... La brita parto de la angla-lingva mondo perdis en la lasta tempo

ĉiam pli da forto kaj influo; la usona parto fariĝis ĉiam pli malŝatata. Ĉio ĉi sumiĝas je ribelo kontraŭ la angla lingvo — fenomeno ankoraŭ nur ĵus naskita, sed klare konstatebla.“

El „Esperanto“, 7—8/1968



En la kadro de la Budapeŝta Specimenfoiro, je la 17—27 de majo., j. k., la Teknika Ligo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis sian duan konferencon. En la konferenco estis prezentitaj dekok raportoj pri diversaj teknikaj branĉoj. El Bulgario prelegis Asen Doĉev je temo „La rolo de la raciiga movado por la teknika progreso en Bulgario“. Raporton pri la agado de la Ligo faris ĝia prezidanto ing. F. Bors (Borŝ). Malgraŭ la relative malfrua anonco de la konferenco, ĝin partoprenis pli ol okdek teknikuloj el kvin landoj.

La organizajn laborojn pri la konferenco modele faris la Teknika Komisiono ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

La administracio de la foiro establis apartan esperantlingvan informservon

por la eksterlandaj gastoj. La turisma entrepreno „Volanturist“ enloĝigis kaj priservis la foirgastojn en Esperanto. Multaj hungaraj entreprenoĵoj eldonis esperantlingvajn prospektojn pri siaj produktaĵoj.

Estis esprimita deziro, ke iu el la venontaj konferencoj de la Ligo okazu en Bulgario en la kadro de la Specimenfoiro en Plovdiv. Tio jam nun devigas la bulgarajn esperantistojn-teknikistojn ekagi aktive ne nur por kreo de forta teknika sekcio, sed ankaŭ por la vasta uzado de Esperanto en la tekniko kaj aparte en la kadro de la Specimenfoiro de Plovdiv.

Ilija Andreev

Noto: Esperantlingvaj prospektoj pri hungaraj produktaĵoj estas riceveblaj de: Teknika Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio, Kenyermezö u. 6, Budapest-VIII, Hungario.

BESTOJ JARCENTULOJ

En la mondo de la vertebruloj oni povas trovi multajn reprezentantojn vivantajn pli ol jarcento. Estas faktoj, ke ezokoj ĝisvivis 250 jarojn.

Ankaŭ al la karpoj oni atribuas enviindan aĝon. En la akvario de riĉa japana familio unu karpo vivis en daŭro de 215 jaroj. Tiu „avo“ estis longa 70 cm kaj pezis 7,5 kg. La fiŝo travivis sep generaciojn ĉe siaj posedantoj kaj nutris sin rekte el iliaj manoj.

En 1936 j. la japana registaro donacis al la Urba Zoologia Ĝardeno en Durban grandegan salamandron, kiu en daŭro de 200 jaroj vivis en la Zoologia Ĝardeno en Tokio. Laŭ iu japana zoologo, tiu 90-centimetra besto povus vivi ankoraŭ 200 jarojn.

Longe vivis ankaŭ la krokodiloj. Estas okazoj kiam preter la riveroj Nil kaj Gang kelkaj generacioj de la loka loĝantaro observis unujn kaj samajn krokodilojn, havantajn distingajn

signojn.

En 1907 j. en la Zoologia Ĝardeno de Londono mortis la 300-jara testudo „Draka“, kaptita ĉe la Galapagaj insuloj cent jarojn antaŭ tio de francaj piratoj kaj nomita al unu pirata gvidanto — Sar Frensis Draka. Multaj aliaj ekzempleroj montras, ke 200—300 jaroj estas normala aĝo por la gigantaj testudoj.

Inter la birdoj ankaŭ estas reprezentantoj, ĝisvivantaj grandan aĝon. Ekzistas papagoj pli ol 150-jaraj, agloj — 250-jaraj kaj aliaj.

La grandaj bestoj estas pli longevivantaj ol la malgrandaj: la elefanto, ekzemple, vivas multe pli ol la muso — meze 120—140 jarojn, kaj iuj individuoj atingis 200 jarojn. Por la balenoj oni supozas, ke ili povas ĝisvivi 500 jarojn. Do estas eble, ke ie ankoraŭ naĝas baleno, kiu estis vaginta tra la oceanoj antaŭ Kolumbo.

Tradukis *T. Dunĉeva*

Skizo de historio kaj literaturo de Esperanto. Red. Alfonso Pechan, Eld. Hungara Esperanto-Asocio, 1966, 190 p., 19.5×14 cm., broŝ.

Vere feliĉaj estas la hungaraj esperantistoj, ke ili ricevis tiun valoran instruhelpilon. Pri simila libro povas sopiri multaj esperantistoj en la mondo, kiuj preparas sin por ekzamenoj. En diversaj landoj oni sentas jam tre akre la mankon de tia gvidlibro.

La skizon pri la historio de la Internacia Lingvo verkis d-ro Stefan Szerdahelyi, Alfonso Pechan, Paul Balkanyi, Ludovik Kókény. La skizon pri la esperanta literaturhistorio verkis d-ro Koloman Kalocsay, Paul Balkanyi, Hen-

GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. VOL. II.

rik Vatré, ĉiuj vaste konataj kaj kompetentaj hungaraj esperantistoj. La aŭtoroj donas ĉion sciendan pri la historio kaj literaturo de Esperanto. En la libro ni trovos materialojn pri la ĝenerala E-movado, ankaŭ pri la Hungara E-movado.

La stilo de la aŭtoroj estas flua, perfekta, la preso bona. Eraroj troviĝas tre malmultaj.

Ĉiuj, kiuj volas aperi al E-ekzameno, nepre devas havigi al si tiun belegan helpilon.

Ni opinias, ke la landaj E-asocioj devas sekvi tiurilate la modelan laboron de la Hungara Esperanto-Asocio.

Iv. Sarafov

PRI LA BULGARA-ESPERANTA VORTARO

Verkante tiun vortaron, la aŭtoroj (kaj ankaŭ la redaktoroj) sciis bone, ke tia granda laboraĵo ne estos ideale perfekta kaj samanka. Tiaspecajn verkojn oni ne devus ĉesi, post ilia unua publikigo, plu prilabori, por forigi enlasitajn neperfektaĵojn, por precizigi iujn tre larĝajn interpretojn, ankaŭ por forigi ne nepre necesajn vortojn kaj aldoni aliajn mankantajn kaj tre uzatajn.

En la antaŭparolo la aŭtoroj deklaris, ke ili akceptus danke ĉiun atenton pri rimarkitaj eraroj, preterlasoj aŭ neĝustaĵoj en la vortaro. Bedaŭrinde, krom la revizia relego de unu el la

aŭtoroj, nur unu konscia uzanto ĝis nun sendis tiajn atentigojn. Liaj notoj ĝuste donas al ni eblon publikigi iujn korektojn, kiujn la uzantoj de la vortaro bonvolu noti, kaj nome:

зловѣдя се estas interpretita malĝuste (pro intermikso kun свѣдя се): la ĝusta signifo estas: veki, kaŭzi malplaĉon, envion. Не ми се зловиди, че синът му успява — Al mi ne kaŭzas malplaĉon (mi ne envias), ke lia filo avancas.

платно (улично, signifo 4): veturejo (de strato); intertrotuaro.

ажур ĝisdata.

гарсонетка — aldonu: kanotĉapelo.

La 21-an de junio j. k. forpasis la elstara hungara samideano

SIMONO CSORA

Li estis konata kiel tre aktiva kaj sindona esperantisto, gvidanto de mul-

taj E-kursoj kaj 10 jarojn redaktoro de „Hungara Fervojista Mondo“. Ĝis sia morto k-do Csóra estis komitatano de „Hungara E-Asocio.

Niaj kondolencoj!



долѣвам — aldonu: ekaŭdi, kapti aŭde, konjekti.

бѣся — aldonu: pendumi, бесѣлка — aldonu: pendumilo.

благополучно — aldonu: feliĉe, senakcidente, senincidente.

бюрò — aldonu: 4. buroo.

вселѣнски (eklez.) — eklezena.

втрѣнчвам се — fiksrigardi.

неурожаѣен неурожайна година, — rikoltporda jaro.

опѣшка — al la 4-a signifo aldonu: atend-vosto.

посветѣн, 3 sign., antaŭ (s.) aldonu: inicita, ensekretigita. Anst. iniculo — inicito.

ознаменувам — vorto mankanta; signifo: signi, memorindigi, memorotigi, neforgesotigi.

Ni varme petas ĉiujn uzantojn de la vortaro averti nin, almenaŭ per poŝtkarto, pri ĉiuj rimarkataj korektindaĵoj en la vortaro.

A. D. Atanasov

Sofia, str. Vl. Popomov 48

AGRABLA RENKONTIĜO

La Centra Komitato de Komsomolo invitis min viziti unu el la naciaj junularbrigadoj, konstruantaj la panoraman vojon Sofio—Burgas tra la fama Roza Valo. Tie mi devis rakonti rememorojn pri miaj kontaktoj kaj renkontiĝoj kun la grandega filo de Bulgario Georgi Dimitrov okaze de la 86-a datreveno de lia naskiĝo.

Krom la belaj impresoj, kiujn mi ricevis de la kontakto kun la junaj brigadanoj, mi deziras noti pli speciale la renkontiĝon kun juna esperantistino, kiu laboris en la brigado. Ŝi nomiĝas Denka Nikolova Ilieva, profesia infaninstruistino, membrino de E-societo „Libero“ en urbo Ruse. Kun ŝi mi havis longan interparoladon en Esperanto antaŭ sufiĉe granda grupo da brigadanoj, kiuj scivoleme aŭskultadis la nekontan al ili lingvon. Kompreneble, post mia foriro ili certe longe demandis sian koleginon pri Esperanto, ĉar ŝi diris al mi anticipe, ke nia interpa-

rolo nepre kaŭzos inter la junuloj intereson pri Esperanto. Des pli, ke en mia parolado antaŭ la aŭditorio mi montris ekzemplon pri ricevo de esperantaj materialoj de germanaj esperantistoj en 1933 j. en ligo kun la preparata de mi eldonaĵo defende al Georgi Dimitrov.

La kamaradino diris al mi, ke en la brigado laboras ankaŭ alia esperantistino, Jordanka Peneva, oficistino en la kamparmastruma kooperativo en vilaĝo Dve Mogili, kie ekzistas E-societo. Tamen en la momento ŝi estis okupita sur laborobjekto malproksima kaj ne povis ĉeesti nian interparoladon.

Al mi estis tre agrable ekscii ke du aktivaj esperantistinoj bone reprezentas la bulgaran esperantistan junularon en la libervola junulara laboro por la prospero de nia socialisma patrujo. Tie ili nepre gajnos novajn amikojn de Esperanto.

Nikola Aleksiev
prezidanto de BEA

En j. „Večerni Novini“ (15. VI. 1968) — informo, ke Bulgara E-Teatro prezentos en Sofio la komedion „Akridoj“ je 17. VI. 1968.

En ĵ. „Balkansko Zname“ — GABROVO (15. VI. 1968) — informo pri la aktiva agado de E-Societo „Verda Standardo“ en Trjavnja.

En ĵ. „Dunavska Pravda“ Ruse (16. VI. 1968) — informo de J. Kalinov pri E-kunveno en Ruse, en kiu parolis A. Poška, sovetia esperantisto, kaj estis honoritaj multaj esperantistoj per la insigno de BEA.

Fn ĵ. „**Haskovska Tribuna**“ (20. VI. 1968) — informo de Ĵ. Zaprjanov pri renkontiĝo de esperantistoj el Stara Zagora, Kazanlâk, urbo Marica, Dimitrovgrad, vilaĝo Meriçleri, kiu okazis en fervojstacio Jagoda.

En ĵ. **Zemedeĵsko Zname** (22. VI. 1968) — en la artikolo „Plovdiv — dua dommastro de la junulara forumo“ la aŭtoro mencias ankaŭ la agadon de junaj esperantistoj.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (22. VI. 1968) — informo pri la honoritaj esperantistoj per la insigno de BEA.

En la sama ĵurnalo (11. VII. 1968) — artikolo „Ankoraŭ 20 000 000 da sklavoj“ de Do-

nald Telford, tradukita el Esperanto de Kiril Kalcev.

En ĵ. „Iskra“ — Kazanlâk (22. VII. 1968) — artikolo „Atingaĵoj de niaj esperantistoj“ de Z. Iv.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (2. VII. 1968) — informo „Esperantistoj de „Verda Raketo“ en Jugoslavio“.

En j. „Šumenska Zarja“ (2. VII. 1968) —
artikolo „Antaŭfestivala agado“ de C. Todorov.

En la sama ĵurnalo (4. VII. 1968) — informo „Honoritaj esperantistoj“ de Cv. Todorov.

— En ĵ. „**Nov Jivot**“ — Kârĝali (9. VII. 1968) — informo de Sijka Raĵĉeva kaj Ivan Nikolov „Junaj esperantistoj“ kun foto de la kurso de Esperanto en la Teknikumo de Metioj (kursdvidanto N. Bojaĝiev).

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (9. VII. 1968) — informo de Atanas Totev „Honoritaj esperantistoj“.

En la sama ĵurnalo (13. VII. 1968) — informo „Krea renkontiĝo de esperantistoj“ pri la renkontiĝo de esperantistoj el Karlovo, Sopot kaj Jambol, kiu okazis en la turita domo „Bakaĝik“.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ (14. VII. 1968) — en la artikolo „Festo de la junuloj“ la aŭtoro L. Maĝarova menciis, ke ankaŭ la junaj esperantistinoj partoprenis la 6-an tagon de la Festivalo.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Dimitr Iv. Daskalov, str. Iv. Bogdanov 3,
Vârșec — interșanșas PM, interesigas pri be-
larto, kosmo, sporto, faŭno— kun ĉl.

Stefan Sokolov (45-jara laboristo), str. Klo-
kotnica 37, Sofio — kun ĉi pri ĉi.

Šanġita, adreso: Violin Oljanov, Bojanski
vodoпад 241, Sofio 80; Oficadreso: Direktoro
de prespropagando, Stambolijski 11-a, tel.
87-35-70.

Ing. Ivan Petrov Petkov (32-jara), Gâlâbovo. Starozagorsko, bl. 2, apart. 6 — kolektaŝlor-paperaĵojn de raztranĉiletoj — novaj kaj malnovaj.

Čeňoslovakio

Mirko Kralik (25-jara), Sladkova 2607, Kromerz — kun bulgaroj.

GDR

H. Bein (35-jara, lernejinspektoro) kaj lia edzino (25-jara) — 4101 Schochurt — kun bulgaroj.

Hungario

Ludoviko Bagies (32-jara), Budapesto, III ker
Vihar str. 2/a — kun bulgaroj.

Pollando

Varsovia, str. Broniewskiego 8/a m 16, Ha-
lina Zitowska — kun. čl.

Turkowski Tadeusz (45-jara), str. Wojska
Polskiego 42/9, Elk — pri muziko kaj peda-
gogio.

Vjetnamio

Nhuyễn Văn Siêu, Tô Sát Hám, Càng Cua-
Ông, Quang-Ninh. — kun bulgaroj.

Sovetunio

Jurij Fedorov, Ĥarkov 23, Vesnina 2A-2 —
kun tuta mondo.

Dez. kor. en Esperanto, franca kaj angla
junaj gestudentoj de fremdlingva fakultato:
k-ino Koŝevnikova Alla, k-ino Dovbyŝ Na-
dejda, k-do Nosov Viktor, k-ino Kurdina Na-
taŝa, k-ino Mustafajeva Lilia, k-ino Perever-
tajlo Saŝa k. a. Komuna adreso: Klub interna-
tionalnoj дружи, Esperanto-sekcio, ul. Ŝukov-
ciskogo 66, Pedagogia Instituto Zaporozje — 2,
Ukrainio, USSR.